





tejo
tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo

Raporto pri la
ĉirkaŭ-paska
Internacia
Junulara



Festivalo (IJF) en
Senigallio (Italujo)

**Novaj
komitatanoj B
prezentas sin**

**Malferma
tago en la
Centra Oficejo**

**Nova TEJO-
volontulo
serĉata**

Karaj legantoj!

Jen la tria ĉi-jara numero de TEJO Tutmonde. Mi esperas ke ĝi plaĉos al vi. Temas pri sufiĉe diversa numero: Krom longan kaj foto-riĉan raporton

pri la IJF en Italujo, vi trovos resumon de interesa prelego de la TEJO-prezidanto Gregor HINKER, kaj la duan aperon de la rubriko Esperanto en Interreto, al kiu ĉiuj estas invitataj kontribui.

Eble vin surprizas ke jam aperas sinprezentadoj de novaj komitatanoj B, kvankam ne okazis baloto pri komitatanoj B (kiujn kutime la TEJO-membroj elektas). Venis nur tri kandidatiĝoj por komitataneco B, dum estis kvar postenoj, tiel ke ĉiuj tri estis aŭtomate elektitaj.

Iom nekutima estas la publikigo de la ĉi-jara laborplano de la TEJO-estraro en ĉi tiu numero. La ideo estiĝis pro tio, ke mi origine esperis publikigi jam en ĉi tiu numero la TEJO-jarraporton 2007-2008 (kiu nun aperos en la venonta numero, post kiam ĝi espereble estos aprobita de la komitato dum la IJK). Kiel alternativon

por ĉi tiu numero, Gregor proponis al mi publikigi la laborplanon, kiu ebligas al la legantoj ekkoni la laboron kaj ideojn de la TEJO-estraro. Mi esperas ke vi trovos ĝin interesa.

Agrablan legadon!

Marcos

Enhavo

IJK 2009 en Ĉeĥujo	3
Seminario pri Vikipedio	3
Novaj komitatanoj B	4-5
Raporto pri la Malferma Tago en la Centra Oficejo	5
Rubriko Esperanto en Interreto	6-7
“Neniu alia komunumo tiom frenezas” – resumo de prelego de la TEJO-prezidanto	7
Laborplano de la TEJO-estraro por 2008	8-9
Raporto pri la Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Italujo	10-14
Semajno de Kulturo Internacia	14
Kontakt-informoj kaj informoj pri TEJO	15
TEJO serĉas volontulon	16

Limdato por 2008:5 – 15-a de septembro 2008!

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

*Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel kunsendita tekst-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER), Jenischstraße 54, 22609 Hamburg, Germanujo. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!***

*Aliaj Esperanto-gazetoj rajtas republikigi artikolojn el TEJO Tutmonde kondiĉe ke ili mencias la fonton. Redaktisto: **Marcos CRAMER** (Germanujo). Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Polujo; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redaktisto kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.***

IJK 2009 en Ĉeĥujo

Komence de Aprilo la estraro de TEJO publikis la jenan informon: “La estraro de TEJO decidis ke plezurano taskon de organizado de IJK en 2009 havas la Ĉeĥa Esperanto-Junularo, kune kun Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj, kaj IJK 2009 okazos en urbo Liberec, Ĉeĥio”.

La kongreson organizos ne unu, kiel kutime, sed tri Landaj Sekcioj. Temas pri la Ĉeĥa, Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj, ĉar Liberec situas en la regiono, kie kuniĝas la landlimoj de tiuj tri landoj.

La nomo de la urbo rolos ankaŭ kiel temo de la 65a IJK, kaj ĝin la organiza teamo intencas pritrakti diversflanke. Komencante de tradiciaj liberecoj formiĝantaj ekde apero de la homa civilizo, kiel ekonomia, religia, aŭ pli vaste spirita liberecoj, transirante al demokratio, kiun

formas ekzemple persona libereco aŭ libereco en ĵurnalismo kaj finante per relative novaj aspektoj de libereco, kiuj sekvas modernigon de la “tutmonda vilaĝo”. Kaj temas ekzemple pri konfronto de kopirajtoj kun libereco en la programada mondo.

Dum la kongreso okazos ankaŭ diversaj ekskursoj, interalie al la ĉeĥa ĉefurbo Prago. Apartan atenton valoras doni al la fakto, ke IJK ankoraŭ neniam okazis en Ĉeĥio.

La junulara kongreso okazos inter la 18a kaj 25a de julio 2009, do rekte antaŭ la Universala Kongreso en Bjalistoko.

Surbaze de informoj de la TEJO-estraro kaj de la LKK

Seminario pri Vikipedio

Dum la aranĝo Sabla Printempo en Písek, Ĉeĥio (4-a ĝis 6-a de Aprilo), E@I (Esperanto@Interreto) kunorganizis seminarion pri Vikipedio. Reprezentis E@I Yves NEVELSTEEN kaj Marek BLAHUŠ.

Vendredvespere okazis ĝenerala prezento pri la libera enciklopedio fare de Jan Urbanek. Jan estas kunfondanto de ĉeĥlingva sekcio de la Vikimedia Fondaĵo.

Sabate antaŭtagmeze Yves rakontis pri la filozofio kaj bazaj verkprincipoj de Vikipedio. Posttagmeze okazis praktika verkado de artikoloj. La celo estis verki pri turismaj lokoj en la regiono de Písek. Ĉeestis la seminarion interalie Petr CHRDLÉ, László SZILVÁSI kaj la fondinto de la ĉeĥlingva Vikipedio, Mirek MALOVEC.

Aktivaj partoprenintoj de la seminario ricevis kiel premion ekzempleron de la Manlibro pri Vikipedio.

tejo tutmonde

Marek prelegis pri E@I kaj ĝiaj projektoj. Okazis ankaŭ prelegoj pri *ipernity*, *Gmail* kaj *Skype*.

Ĉi-jare por la unua fojo la urbo Písek finance subtenis Sablan Printempon. Ideo estas ĉiujare ĝin organizi kaj allogi pli da eksterlandaj partoprenantoj. Ĉiam kiam aktivuloj renkontiĝas, ekestas planoj por la estonteco. Pri Vikipedio estas interalie plano fari kromajn seminariojn dum UK en Roterdamo kaj en Hungario. Dum KAEST en Dobřichovice ideo estas okupiĝi pri verkado de fakaj artikoloj en Vikipedio.

La aranĝo Sabla Printempo plej supozeble okazos similstile ankaŭ dum venontjara printempo kaj organizantoj celas atingi fakecon kaj internaciecan etoson. Ĉiukaze la temo estos denove “Esperanto kaj Interreto” kaj la plano estas ke E@I denove ĝin kunorganizu.

Laŭ E@Info

Novaj komitatanoj B

Al la alvoko por kandidatiĝi kiel komitatano B venis respondoj de tri kandidatoj. Ĉar ni laŭstatue rajtas havi kvar komitatanojn B ĉi-jare, ĉiuj tri estis aŭtomate elektitaj sen baloto. Temas pri Nicola RUGGIERO, Irmina SZUSTAK kaj Aleksandra KOVYAZINA. Al la peto sendi sinprezentojn repondis Aleksandra kaj Irmina.

Aleksandra KOVYAZINA

- *Loĝloko:* Origine, mi estas de la bela urbo Jalto situanta ĉe Nigra Maro en suda Ukrainio. Sed nuntempe mi loĝas en Bydgoszcz, Pollando. Kie mi vojaĝos poste, ankoraŭ ne scias.

- *Aĝo:* 23 jaroj

- *Profesio/studfako/vivokupo:* Ĵurnalisto. Nuntempe studento pri turismo.

- *Ĉefaj aktivaĵoj/interesoj en la Movado:* Disvastigi esperanton por "alia mondo". Aktivigi esperantistojn en tutmonda agado. Propagandi Esperanton. Organizati pli da Esperanto-aranĝoj

- *Ŝatokupoj:* Mi tre ŝatas vojaĝi, ŝatas

grimpi en montojn kun amikoj kaj ŝatas konatiĝi kun novaj homoj. Mi tre ŝatas partopreni kulturajn festivalojn. Mi ŝatas ĉion neordinaran kaj ordinaran ;-)

- *Kion vi volas atingi dum via oficperiodo:* Uzi mian vivsperton por la Esperanto-movado. Fari ĉion kion mi povas por la Esperanto-movado, kaj plifortigi la konekton inter esperantistoj.

- *Vivdevizo:* Zorgi kaj plibeligi pri la mondon ĉirkaŭ ni.

Irmina SZUSTAK

- *Loĝloko:* originale Varsovio, Pollando; nuntempe Haifo, Israelo

- *Aĝo:* 25

- *Profesio/studfako/vivokupo:* profesio – geologo; nuntempe volontulo en Bahaa



Monda Centro en Israelo

- Ĉefaj aktivaĵoj/interesoĵ en la Movado: internaciaj rilatoj, organizado de Esperantaj renkontiĝoj, instruado de Esperanto

- Ŝatokupoj: vojaĝado, montgrimpado,

amikumado

- Kion vi volas atingi dum via oficperiodo: privilegii kunlaboradojn inter landaj sekcioj de TEJO

- Vivdevizo: "La Tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj"

Raporto pri la Malferma Tago en la Centra Oficejo (CO)

La 26an de Aprilo 2008 okazis la printempa Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA/TEJO en Roterdamo. Entute 125 vizitantoj el 19 landoj plenigis la UEA-domon. Inter ili estis ankaŭ ĉiuj estraranoj de UEA, kiuj tuj post la Malferma Tago havis 3-tagan kunsidon. Kiel kutime estis diversaj prelegoj, ĉi-foje kun la temo "Centjariĝo de UEA". La prezidanto de UEA, prof. Probal DASGUPTA, titolis sian prelegon "Historio por malfermi la estontecon". D-ro Ziko VAN DIJK faris du-partan prelegon pri "UEA tra la tempoj". Plene konkeris la publikon Nanne KALMA kaj Ankie VAN DER MEER el la kantogrupa Kajto, kiuj donis du unuhorajn koncertojn. La librosservo ofertis librojn favorpreze, estis bazaro de esperantaĵoj en la sekretario kaj senpagaj kafo kaj kuko en la manĝejo.

Flanke de TEJO okazis duonhora prelego de Gregor HINKER, la TEJO-prezidanto, kun helpo de la nuna TEJO-volontulino Julia NOE. Dum la tuta tago ankaŭ eblis partopreni en la domĉasado. Tiu konsistis el kvizaj demandoj, kies respondoj troviĝis en la tuta CO. Entute partoprenis la kvizon ses personoj, kiuj

ricevis premiojn. La ĉeestantoj povis informiĝi pri TEJO per la TEJO-informtabulo kaj kunpreni senpagajn informmaterialojn.

Post la Malferma Tago okazis por la stabo de la Centra Oficejo, kelkaj eksoficistoj kaj aliaj gastoj bankedo okaze de la centjariĝo de UEA, la 28an de aprilo 2008.

Raportis Julia NOE, Germanujo
TEJO-Volontulo en la Centra Oficejo



Kelkaj el la pli junaj partoprenantoj de la Malferma Tago

Rubriko Esperanto en Interreto

Reta vortaro

<http://reta-vortaro.de/>

Reta Vortaro (ReVo) estas ĝenerala Esperanto-vortaro en Interreto. Ĝi enhavas difinojn en Esperanto, kaj tradukojn al pluraj aliaj lingvoj, plej multe al la rusa, hungara, franca, germana, belorusa, nederlanda, portugala kaj angla.

Kun 9820 kapvortoj kaj 21948 leksikaj unuoj ĝi estas malpli granda ol PIV (la nova PIV havas 16780 kapvortojn kaj ĉirkaŭ 46890 leksikajn unuojn). Al la avantaĝoj kompare kun PIV tamen ne nur apartenas la alilingvaj tradukoj, sed ankaŭ ke ĝi ne estas tiel naturalisma kaj franceca kiel PIV (kiu listigas, kaj tial kvazaŭ rekomendas, multajn tute nebezdonatajn novradikojn).

Ĉiu sperta Esperantisto povas kunlabori por plibonigi ReVon, ĉu per provizado de alilingvaj tradukoj, ĉu per proponado de listigindaj radikoj aŭ kunmetaĵoj, ĉu per

diskutado pri la ĝusteco de difinoj. Se vi interesiĝas, vizitu la jenan retpaĝon: reta-vortaro.de/revo/dok/redinfo.html

Eventeo

<http://www.eventeo.net>

Pasintan decembron komencis funkcii “Eventeo”, nova internacia novaĵ-paĝaro en Esperanto, kie ĉiutage aperas pluraj novaĵoj, mezlongaj artikoloj pri diversaj temoj el diversaj kontinentoj de la mondo.

Por vizitantoj donas tre agrablan impreson la strukturo de la portalo, la stilo kaj nivelo de la uzata lingvo, kaj ankaŭ la modesta sed eleganta aspekto.

Laŭ Libera Folio, la kreintoj estas francoj, kiuj volas resti anonimaj, dum la retpaĝaro estas en testa fazo. Ili

tamen rakontis pri sia labormaniero: "Ni legas gazetojn el multaj landoj (Eŭropaj landoj, sed ankaŭ el Norda kaj Suda Ameriko, Azio, arabaj landoj ktp...), kompilas informojn, resumas ilin kaj tradukas esperanten. Ni provas ĉiutage aldoni novaĵojn pri ĉiaj temoj, ĉu pri

scienco, ĉu sociaj temoj, foje eĉ amuzaj temoj, sed vere estas, ke foje gravaj okazaĵoj alprenas la unuan rangon!"

Laŭ statistiko aperigita en Eventeo mem, jam aperis pli ol 600 artikoloj tie, kaj dum la monato majo estis 24 289 vizitoj al la retpaĝaro.

Neniu alia komunumo tiom frenezas

Julia HELL resumas prelegon de la TEJO-prezidanto Gregor HINKER faritan dum la ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso.

Okaze de la Germana Esperanto-Kongreso en Essen (Germanio) inter la 9a kaj la 12a de majo, TEJO-prezidanto Gregor HINKER prelegis pri la GEK – temo: Malkovru viajn antaŭjuĝojn.

Evidente, la aŭskultantaro scivolemis pri la fakto, ke dank' al Esperanto oniaj antaŭjuĝoj nun havas fundamenton el propraj spertoj – almenaŭ tiel estis la titolo. Estis interese, ke post la klarigo de la signifo de antaŭjuĝoj estis prezentitaj ne nur diversaj ekzemploj kiel "Dolĉaĵoj malbonas por la sano", sed ankaŭ pluraj aspektoj de la temo, ekzemple ke antaŭjuĝoj ebligas scii sen koni kaj argumenti sen argumento.

Antaŭjuĝoj havas multajn funkciojn kaj efikojn; ili ekzemple forte kontribuas al la funkcioprincipo de diskriminacio. Precipe per mempravigaj prognozoj kiel "Kun eksterlandanoj oni parolu en simpligita lingvo, ĉar ili ne bone regas la lingvon." Estas klare, ke se multaj homoj agas laŭ tiu diraĵo, ili fakte kontribuas al tiu principo kaj realigas la prognozon. Ĝi finfine iĝas mempraviga kaj estas

ĝenerale akceptita kiel la vero. Alia interesa penso estis ke la kora intuicio estas unu varianto de antaŭjuĝoj, sed ke ĝi estas pli serioza kaj gvidas vin al viaj sekretaj scioj kaj celoj.

En la sekva parto de la prelego Gregor HINKER prezentis diversajn antaŭjuĝojn pri kaj ene de la Esperanto-movado. Li montris ke antaŭjuĝoj estas ĉie trovebla kaj ke ankaŭ la Esperantistoj uzas ilin. Ĉu vi jam aŭdis ke ni estas la plej internacia kaj freneza komunumo?

Tamen antaŭjuĝoj havas pozitivajn efikojn: Ili plifaciligas la kompleksan mondon, ili helpas identiĝi kun grupo kaj tre bone utilas se vi intencas manipuli homojn.

Simple estas nia respondeco decidi pri kiel trakti antaŭjuĝojn – eksigi ilin ne eblas. Kaj finfine estas pli bone ke oni parolu pri ni baze de antaŭjuĝoj ol ke oni ignoru nin – la plej frenezan kaj internacian komunumon.

Julia HELL, Chemnitz (Germanio)

Laborplano 2008 de la TEJO-estraro

Jen estas la laborplano de la TEJO-estraro por 2008. Ni publikigas ĝin en TEJO Tutmonde por montri al la membraro kion faras kaj planas nia estraro, kaj por pli bone kompreni kiel funkcias nia organizo.

1. IJK IJK (Internacia Junulara Kongreso) estas la plej prestiĝa kaj grava evento de TEJO, cetere nia plej bona vizitkarto ene de kaj ekster la movado, kaj ĝi kompreneble estas unu de la prioritatoj de ĉiu TEJO-estraro.	IJK 2008 Realiga horizonto: 2008-08 <i>LKK 2008</i> Subteni la Lokan Kongresan Komitaton (LKK) en la organizado. Konstanta kontakto kaj interŝanĝo de informoj. IJK 2009 Realiga horizonto: 2008-03-31 <i>Serĉi kandidatojn</i> Organizi kampanĵeton por instigi Landajn Sekciojn kandidatiĝi, daŭrigi la informfluan Realiga horizonto: 2008-04-10 <i>Elekti kandidaton</i> Decidi pri IJK 2009 Realiga horizonto: 2009 <i>LKK 2009</i> Kunlabori kun la LKK en ĉiuj aspektoj
2. Informi kaj krei retojn I: eksteren Daŭre defia tasko estas komuniki la ideojn de nia movado kaj specife de nia asocio al la „ekstera mondo“, kaj daŭre serĉendas kaj trovas novaj vojoj kaj metodoj. La celoj estu unuflanke vortumi klarajn poziciojn kie eblas, kaj aliflanke uzi la lingvajn kaj aspektigajn rimedojn necesajn por efika komunikado.	Realiga horizonto: 2008-06 <i>Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER)</i> Reaktivigi KER kaj rekonsideri ĝiajn taskojn kaj misiojn Realiga horizonto: 2008-07 <i>Plurlingva Retejo</i> Anglalingva TEJO-retejo kiu disponigas gravajn informojn pri TEJO kaj IJK. Realiga horizonto: 2008-07 <i>Misio kaj politikaj pozicioj de TEJO</i> Verki poziciaron de TEJO: niaj interkonsentitaj opinioj rilate al internacia komunikado, la uzado de la angla, ktp. Ni debatu pri niaj pozicioj kaj valoroj, kaj kreu opinionaron por la retejo („FAQ about TEJO“) Realiga horizonto: 2008-xx <i>Grafika refreŝigo</i> Grafika refreŝigo de la aspekto de TEJO-materialoj kaj -retejo; kreado de „grafika identeco“: simbolo, koloroj, tiparoj ktp; bazita laŭeble je liberaj programaro kaj tiparo.
3. Informi kaj krei retojn II: interne Ankaŭ ene de la junulara Esperantista movado la rolo de TEJO ne estas tiel klara. Ĉu ni estas	Videbligi TEJO-n kaj ĝiajn servojn al Landaj Sekcioj Realiga horizonto: 2008-xx: <i>Grafika identeco de TEJO</i> Realiga horizonto: 2008-xx: <i>Plurlandaj varbiloj kaj RIC</i> Instigi komunan uzadon de varbiloj fare de pluraj Landaj Sekcioj kaj TEJO; ligo per kunlaboro kaj grafiko (pluraj

klubo kiu regule okazigas la moĵojan IJKn kaj kunsidas en strangaj meditaciaj rondoj („komitatkunsidoj“)? Ni komune cerbumu pri kiuj estas la ĉefaj internaj celoj, la grandaj kompetentoj de TEJO kaj kiel ni plej bone komune profitu el ili. Alia praktika celo estas plifaciligi la laboron de la Komitato per disponigo de sistemo por reta voĉdonado.	simboloj). Revivigi la Retan Inform-Centron (RIC) Realiga horizonto: 2008-xx: <i>Baza retejo por Landaj Sekcioj</i> Disponigi al Landaj Sekcioj kiuj ne posedas propran retejon bazan retpaĝon ĉe www.tejo.org/[nomo_de_la_lando]. Plifaciligi la Komitatan laboron Realiga horizonto: 2008-07: <i>Reta voĉdonado</i> Reta voĉdonado estas malnova ideo, sed ĝis nun ne realigita. Ĝi igu pli facila.
4. Kompetentoj ene de TEJO Pluevoluigi kompetentojn „Aktivula Trejnado“ estas unu de la klasikaj aktivecoj de TEJO. Por tiu ĉi periodo ni koncentriĝas je du trejkampoj kaj celas organizi seminariojn tiurilatajn. Konservi kompetentojn Grava problemo (cetere de preskaŭ ĉiuj junularaj neregistaraj organizoj) estas la - dokumentado de aktivecoj - konservado de dum la aktivecoj evoluitaj kompetentoj - transiro de eksaj aktivuloj en neaktivan staton sen ĉesado de iu ajn aktiveco Konkretaj ideoj por plibonigi tiun dilemon estas la „saĝulejo“ kaj pli efika datenstoksistemo. - informadikaj iloj (stokado de datenoj en serviloj, iloj kiuj helpas dokumenti propran laboron) - „Saĝulejo“: kunigi eksajn TEJO-aktivulojn (ĉefe eksajn estraranojn kaj komisiitojn) en retliston; tiel oni kreas forumon kiun oni povas konsulti se bezonatas konsiloj, komentoj <i>sen ajna devigo</i> por la tie kunigitaj eksuloj (ili povas respondi, nur kunlegi au ignori laŭvole)	Realiga horizonto: 2009-xx: <i>Aktivula Trejnado</i> Organizi seminariojn pri jenaj temoj: - <i>Lingvaj rajtoj</i>. Unu de la plej ofte uzataj temoj en la varbado por Esperanto kaj klarigo de la celoj de TEJO. Sed kion ĝi fakte signifas? - <i>Organizado de internaciaj renkontiĝoj</i>. Ene de nia movado estas multaj kompetentuloj pri diversaj aspektoj de organizado. Ni pludonu niajn spertojn por ke ne ĉiuj devu lerni el propraj eraroj. Realiga horizonto: 2008-05 „Saĝulejo“ Kunigi eksajn TEJO-aktivulojn en retliston. Ĝi estu forumo kiun oni povas konsulti se bezonatas konsiloj, komentoj sen ajna devigo por la tie kunigitaj eksuloj Realiga horizonto: 2008-xx <i>Dokumentado</i> Konservado de datenoj kaj dokumentado de la aktivecoj ene de TEJO. Tiel estiĝu historia memoro kaj konservado de kompetentoj akiritaj de antaŭaj aktivulaj generacioj.

Raporto pri la Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Italujo

- Ĉu vi veturos al Senigalio?

- #\$\$%^&*????

Mi tute ne kapablis kompreni pri kio temas kiam oni demandis min la unuan fojon. Nu klare, IJK en Hungario, MIRO en Kroatio, sed kio en Senigalio??? Respondo venis de la paĝaro de ILEI: tradicia aranĝo dum paskaj ferietoj – IJF okazos apud Ankono (itale Ancona) en ĉemara ripozurbeto nomita Senigalio (itale Senigallia). Aliĝilon mi plenigis tuj, ĉar memzorganta kotizo ne timigis. Bedaŭrindis tamen ke pro familiaj kialoj mi povis ĝui esperantumadon nur ĝis la paska dimanĉo, do entute 3 tagojn ĉe la Festivalo.

Veterproгноzoj por tiuj tagoj ne estis favoraj kaj malbonŝance estis tute veraj. Do alveninte al la IJF-ejo, mi estis sufiĉe laca kaj malbonhumora, pro subpluva piediro ekde bushaltejo ĝis la ĉefa ejo.

Nur poste mi eksciis ke oni rajtas senpage uzi publikan transporton dum la Festivalo, se oni posedas specialan ŝildon ricevitan dum registrado. Kiom zorgemaj estis la organizantoj! Tiuj etaj surprizoj, unuavice, videbligas la profesiecan aliron al traktado kun urbestaro kaj, due, estas ĉiam alte aprezitaj ĉe junularaj aranĝoj, ĉar ni estas verduloj kaj ne emas uzi aŭton nur por iri al supermerkato, ĉu ne? Ĉiuj duboj malaperis kiam mi eniris la hotelon, kiu estis la loĝejo por plejparto de la partoprenantoj kaj la ĉefa festivalejo. Mi ekvidis tie vizaĝojn de malnovaj amikoj (vidu la foton sube) kaj timemajn kaj ĉarmajn novulojn. Ĵetinte rigardon al la programtabulo, mi tuj komprenis ke mi alvenis nevane!

Salutoj, registriĝo (foto sur la sekva paĝo), denove salutoj, rapida memzorga tagmanĝo, kaj jen mi pretas sekvi la programon! Mi elektis “Kiel subvencipeti” de Ilja DE COSTER, kiel kutime seriozan kaj altnivelan. Post tio mi trafis prezenton de la unua, ĵus eldonita, libro de Nicola RUGGERIO (prezidanto de IEJ, la Itala Esperanto-Junularo). Tie mi tute hazarde venkis konkurson kaj ricevis libron kun subskribo de aŭtoro, pri kio mi tre fieras. La libro jam estas legita kaj tio plenigis min je respekto al la



juna aktivulo, kiu certe onte ankaŭ estos sukcesa Esperanto-poeto.

Intertempe alvenadis novaj esperantistoj kaj ĉiuj ejoj pleniĝadis per Esperanto-konversacioj. La festivalo estis vere internacia kaj junulara, ne nur pro tio ke venis geesperantistoj de deko de Eŭropaj landoj kaj ankaŭ de Brazilio, Rusio kaj Ĉinio. Eĉ senegalianoj ne mankis! La estro de hotelo estis lokano kaj aldone Esperanto-komencanto. Li estis tre afabla kiel persono kaj ofertis rabatitajn prezojn en sia trinkejo por festivalanoj. Denove dankindas orga-nizantoj pro sukcesa surloka laboro! Internaciecon oni ankaŭ spertis pro tio ke kelkaj programeroj temis, ekzemple, pri fora Argentino (J. TARDUCCI) kaj afrikaj lingvoj kaj ludoj (Nino VESELLA).

Menciindas ke ĉeestis ankaŭ kelkaj junuloj-gajnintoj de monhelpaj konkursoj. Laŭ mi, tio tre gravas ĉar, unuflanke solvas “kutiman” junularan problemon kovri vojaĝkostojn kaj, aliflanke, motivigas kontribui al programo. Tiamaniere gajnas ĉiuj: partoprenantoj, gajnintoj kaj organizantoj!

Vespere la programo proponis al ni hiphop-dancadon, diskejon, gufujon kaj ludejon, kie oni amase ludis Bao-n kaj Ĉangamano-n (afrikanaj tabloludoj). Noktan programon mi maltrafis, ĉar foriris dormi sufiĉe frue, intentante ekde mateno prepariĝi por prelego pri la rusa lingvo, kiun mi kungvidis.

La sekva tago (vendredo) postulis de mi iom da program-oferoj matene. Bonŝance mi ne bezonis Esperanto-kurson por komencantoj (Anna LOEWEN-STEIN), kaj ne malsatis, do ne iris al la



kuirarta kurso (G. DI LUCCA). Min jam atendis moskvano Anna VIBORNOVA, agadema kaj sperta pri instruado, kun sia edzo Vladimir. Kontribuis ankaŭ Elina KORYAK, unu de organizantoj de la IJF. Do por informiĝi pri la cirila alfabeto, la nuntempa lingva situacio, idiomaĵoj kaj langrompiloj venis pli ol 20 homoj al nia prelego. En la fino ni, la prezentantoj, provis kanti la himnon de Rusio kiel veraj patriotinoj, kaj por komuna kontento disdonis premiojn al la plej aktivaj partoprenantoj (vidu la foton sur la sekva paĝo sube).

Post sukcesa prelego ĉiuj sekvis la programon laŭ propra plaĉo. Mi trafis la diskutrondon de Gregor Hinker pri TEJO



kaj la movado ĝenerale. Pro ĉeesto de pli spertaj esperantistoj (Renato CORSETTI, R. TRESOLDI) sed ankaŭ novuloj rezultigis interesa interŝanĝo de opinioj. Post tio, dume kelkaj foliumis librojn en libroservo, aliaj apude studis latin-amerikanajn dancojn (D. DE RUVO) (vidu maldekstre). Oni pretiĝis por Labambo, plejverŝajne.

Laŭ programo, oni alternative havis eblecon studi la italan lingvon (D. ASTORI) aŭ progresigi sian Esperanton (Gunter NEUE), kaj tuj post tio ekscii pri “Komunikado de propra agado” (denove Ilja DE COSTER) aŭ en alia salono ludi





sudokon sub gvidado de la senlaca ridemulo Gunter NEUE (vidu supre).

La vespera programo riĉis je muziko – nin atendis 2 sinsekvaj koncertoj. Unue elpasis toskano Piero NISSIM kun judaj kantoj tradukitaj al Esperanto kaj novaj kantoj, kiujn li prezentos dum venonta UK en Roterdamo. Alia koncerto estis tiu de Gianfranco MOLLE (foto sekvapaĝe) kun kantoj de Fabrizio D’ANDRE, fama itala kantisto de antaŭnelonga pasinteco. Etoso estis bonega kaj ĉiuj, ŝajne, estis en festivalejo, babilante, ludante, gustumante teojn en gufujo kaj sangrion en trinkejo. En gufujo okazis provlegado de morgaŭa teatraĵo “Doktoro

Zamenhof” de Mario Migliucci, kiu pro mallumo kreis vere magian senton de tuŝado de historio.

Tiu vespero provizis al mi surprizon tre valoran: mi renkontiĝis kun du miaj amikinoj post 3 kaj 4 jaroj respektive!!! Vivu Epsperantuj’, kie oni retrovas unu la alian eĉ kiam blogoj kaj tujmesaĝiloj ne funkcias! Indis profiti la momenton, do la nokton mi plene dediĉis al amikumado, al intensaj novaĵ- kaj ide-interŝanĝoj. “Noktofino” venis je la tria, sed “tute ne gravis”, ĉar ĉiuokaze mi ne povis ekskursi en la bela universitata Urbino pro mia forveturo. Kaj ĝuste tiel okazis,



matene mi gvidis duan prelegon pri la rusa lingvo (kun kontribuo de Katja Ignatjeva), tagmanĝis ĉe marbordo kaj poste kelkaj festivalanoj akompanis min al stacidomo. En la trajno, kiu portis min for de amikoj-esperantistoj, mi ne sukcesis eviti verdan sindromon. Tamen donis esperon la penso ke estos nova IJF kaj ke antaŭ tio okazos ankoraŭ multaj aliaj partoprenindaj Esperanto-aranĝoj!

Atentu: oni jam anoncis venontan IJFon apud Rimini, de la 8a ĝis la 14a de aprilo 2009. Profitu la unuan aliĝperiodon kaj aliĝu anticipe ĉe iej.esperanto.it/ijf/ !

Ĝis tuj en Esperantuj'!

Alla Kudryashova (Bolonjo/Moskvo)

Semajno de Kulturo Internacia

IEJ (Itala Esperantista Junularo) invitas junajn geesperantistojn veni al Italio en Septembro por evento kiu celas prezenti plurkulturecon en lernejoj pere de Esperanto.

La evento okazos proksime al Pisa dum 7 tagoj, de la 18a ĝis la 24a de septembro.

Ĉiuj surlokaj kostoj estos kovritaj kaj estas ebleco ke ankaŭ vojaĝ-kostoj kovriĝos, precipe por tiuj, kiuj sendos fruan kandidatigon.

Interesatoj devas sendi kandidatig-leteron al kandidatigxoj.ski@gmail.com kun jenaj informoj:

- Nomo
- Familia nomo
- Sekso

- Naskiĝdato
- Retadreso
- Loĝurbo
- Adreso
- Nacieco(j)
- Kiam kaj kiel vi esperantiĝis?
- En kiuj esperanto-renkontiĝoj vi jam partoprenis?
- Kiel vi prezentus vian landon al mezlernejaj knaboj?
- Ĉu vi konas popolajn dancojn el via lando? Kiujn? Ĉu vi pretas ilin montri?
- Ĉu vi kapablas ludi muzikon aŭ kanti popolajn kantojn de via lando?
- Ĉu vi kapablas kuiri tipajn manĝaĵojn el via lando? Kiujn?

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, la *Universala Esperanto-Asocio*.

TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto.

La organizo defendas kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas kadro de niaj klopodoj.

Retadreso: www.tejo.org

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Tel.: (010) 436 1044
Faksilo: (010) 436 1751,
Retadreso: uea@co.uea.org

Estraro de TEJO

• Gregor HINKER (Prezidanto, Eksteraj Rilatoj)
Schelleingasse 54/24, 1040 Wien, Aŭstrujo
Retadreso: gregor@tejo.org

• Anna-Laura H. WICKSTRÖM (Ĝenerala Sekretario)
Universitätsstr. 57, 8006 Zürich, Svisujo
Retadreso: anna-laura@tejo.org

• Vildana DELALIĆ (Seminarioj kaj aktivula trejnado)
A.B. Šimića 5 ,Sarajevo 71000, Bosnujo-Hercegovino
Retadreso: vildana.delalic@hotmail.com

• Sergej TYRIN (Kasisto)
P.O.K 15092, Be'er Ševa 84120, Israelo
Retadreso: interdist@gmail.com

• Rogener PAVINSKI (Landa agado)
Av. Lafaiete Costa Couto, 1447
Ribeirão Preto - SP - Brazilo - 14060-450
Retadreso: rogener@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la gazeton TEJO Tutmonde
- la revuon Kontakto
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso kaj la Internacia Seminario
- eblecon partopreni en seminarioj
- eblecon havi blogon ĉe tejo.org
- eblecon envolviĝi en interesa kaj internacia agado

Kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ de la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la esperanta movado.
- Aktivula Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo, la adresaro de gastigantoj kiuj pretas senkoste gastigi Esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subtenu la agadon de TEJO

Ekzistas multe da eblecoj helpi TEJO-n en sia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi. Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado"). Ankaŭ eblas donaci tiel por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
- Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO

Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

TEJO serĉas volontulon!

TEJO invitas vin kandidatiĝi por la posteno de plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. TEJO-volontulo devas preti labori dum 12-18 monatoj kiam la periodo de volontulado de la nuna TEJO-volontulo Julia Noe finiĝos, do ekde la 1a de novembro 2008. La limdato por kandidatiĝi estas la 15a de septembro 2008. TEJO strebas al tio, ke konstante estu TEJO-volontulo en Centra Oficejo, kiu povu dediĉi cent elcentojn de sia labortempo al TEJO. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de TEJO, sed samtempe signifas spertan pliriĉiĝon ne nur personan, sed ankaŭ movadan. La estraro limigas la daŭron de volontulado al proksimume unu jaro, tiel ebligante al multaj akiri tiujn spertojn. Kiel volontulo vi certe lernos memstare labori kaj povas profundigi viajn spertojn en la sube menciitaj taskoj, se viaj spertoj estas bazaj.

La TEJO-volontulo ankaŭ dum kongresoj (IJK kaj UK) kaj TEJO-seminarioj estu la "vizaĝo" de la organizo, informante al membroj kaj aliaj interesatoj pri agado, aranĝoj, servoj ktp de TEJO.

La TEJO-volontulo laŭeble:

- havu tre bonan Esperanto-nivelon (legan, skriban kaj parolan)
- scipovu la anglan kaj (/aŭ) francan; scipovo de aliaj lingvoj estos pozitive konsiderata
- ŝatu administran laboron
- estu sperta pri komputil-uzado (retpoŝto, interreto, tekstprilaborado, ktp)
- havu profundajn konojn de la junulara Esperanto-movado
- estu kapabla memstare preni decidojn
- estu preta aktive kunlabori kun la estraro de TEJO rilate al la ĝenerala funkciado de la organizo
- havu konojn de la eŭropaj junularaj

strukturoj kaj eŭropaj instancoj

La laboro konsistas el:

- pritraktado de la poŝtaĵoj (paperaj kaj retaj) de TEJO
- prizorgado de la TEJO-arkivo
- administrado kaj prizorgado de kontaktoj kun eŭropaj kaj neeŭropaj strukturoj kaj organizoj
- aktiva subtenado de la agado de la estraranoj kaj komisiitoj de TEJO
- aktiva kunlaborado en la verkado de subvencipetoj
- aktiva kunlaborado en la aktualigo de la retpaĝoj de TEJO

- eventuala redaktado de TEJO-Aktuale

La volontulo ricevas senkoston ĉambron en la CO kaj dignan poŝmonon kiu garantias la vivtenon. Kandidatoj estas invitataj sendi al la Centra Oficejo kaj Ĝenerala Sekretario de TEJO la jenajn dokumentojn esperantlingvajn:

- vivresumon (priskribas viajn studojn, kursojn, spertojn ktp)
- motivigan leteron (priskribas kial vi volas volontuli por TEJO)
- laŭeble pruvilojn de la supre postulataj kapabloj kaj rekomendleteron de ekzemple landa Esperanto-organizo.

Se vi kandidatiĝas per retpoŝto, bonvolu skribi kaj al officejo@tejo.org kaj gxen-sek@tejo.org.

Grave:

Momente TEJO-volontulo devas daŭre labori en la Centra Oficejo en Roterdamo. Nunaj kondiĉoj en Nederlando ne permesas al TEJO akiri labor- aŭ restad-permeson por ne-civitanoj de Eŭropa Unio. Tial la kandidato devas mem havi rajton laŭleĝe restadi dum la necesa periodo sur la teritorio de Nederlando.

La volontulo devas esti individua membro de TEJO.